# TAMEN ★ PLU!

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO JULIO 2006 / JARKOLEKTO 25

*Bob Felby - Tel (08) 8242 1460 - 6 Dorset St. Semaphore Park. S.A. 5019 - esperantobob@iprimus.com.au*

*Ankaŭ disponebla surrete ĉe la retejo de Esperanto en Sudaŭstralio: http://sa.esperanto.org.au*

***Aliŝtatano, kompreneble ne sudaŭstraliano, ferias en la kamparo. Je sia surprizo li vidas viron, kiu sidas alte en arbo kriante tiom laŭtege kiom liaj pulmoj nur permesas.***

***"Kion en la mondo vi faras tiom alte en la arbo?" scivoleme demandas la viktoriano.***

***"Mi forpelas la leonojn," respondas la viro.***

***"Ĉu leonoj, sed estas neniuj leonoj ĉi tie," diras la viktoriano.***

***"Ne, kompreneble ne, ĉar mi ja forpelas ilin!"***

## Kredu tion aŭ ne!

**Same kiel pasintan monaton, ankaŭ ĉimonate okazis terure grava akcidento al unu el niaj membroj.**

**Atendante ĉe vojkruciĝo Eileen Jones estis renversita de aŭtomobilo, ankoraŭ ne sciatas ĉu intence aŭ akcidente, sed la lumo estis verda kaj ŝi havis ĉiun rajton transiri. Sed venis aŭtomobilo ĉirkaŭ la angulon, ĝi renversis ŝin kaj surveturis ŝian dorson. Malsanulveturilo transportis ŝin al la malsanulejo, kie ŝi restis kvin tagojn. Poste oni sendis ŝin al la Reĝa Malsanulejo en Adelajdo, kie ŝi restis unu aŭ du tagojn. Nun ŝi ĝuas sian restadon hejme, kaj ni ĉiuj deziras al ŝi baldaŭan resaniĝon!**

***Iu viro, ni ne menciu lian nomon, sed li ne estis el Adelajdo. havis problemojn pri seksumado. Li konsultis sian kuraciston, kiu konsilis al li, ke li ĉiutage kuru 10 kilometrojn. Du semajnojn poste la junulo telefonis al sia kuracisto dirante, ke li bone sekvis lian konsilon.***

***"Nu," diris la kuracisto, ĉu tio helpis?"***

***"Mi ankoraŭ ne scias, mi estas 140 kilometrojn for de mia hejmo…!"***

## Edukado

**Se vi vere deziras lerni kiel senerare uzadi Esperanton, tiam trastudu pli ol nur unu fojon la verkon por la nuna, moderna jarmilo: "Lingvaj Resondoj".**



**Tiu ĉefverko de la fama Esperantologo kaj nemalhavebla instruisto, en niaj Somerkursaroj kaj Kongresoj, Marcelo Leereveld, haveblas nun de la verkinto, 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur $22,00.**

***Konata kantisto kantis antaŭ la malsanuloj en malsanulejo. Post la kantado li diris: "Do, nun mi diras "ĝis revido" al vi ĉiuj, mi esperas, ke vi baldaŭ resaniĝos."***

***"Dankon, kaj same al vi," respondis la gemalsanuloj.***

---

## Gravaj Esperanto-eventoj

**Merkredon la 5an de julio ni kunvenos en Clarence Park ekde la 18a horo.**

**Merkredon la 19an de julio ni kunvenos en Clarence Park ekde la 18a horo.**

**La 91a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 2006 en belega Florenco, Italujo.**

Sabaton la 24an de septembro ni ĉiuj ekskursos al Haveno Viktoro.

Dimanĉon la 15an de oktobro, je la 18a horo, okazos kantado, pian- kaj mandolinbanĝomuziko ĉe Indrani, 1/20 Fletcher Street, Woodville North, S.A 5012, telefono 8268 4021.

La 22a Somerkursaro kaj Kongreso okazos en 2007 en Hobarto, Tasmanujo.

De la 4a ĝis la 11a de aŭgusto 2008 la U.K. okazos en la belega urbo, Jokohamo, Japanujo.

*"Mi devas aĉeti donacaĵon al junulo, kiu verkas Esperanto-poemojn!"*

*"Jes, ĉu mi rajtas rekomendi tiun ĉi belegan paperkorbon?"*

Biografio de

## Indrani Beharry-Lall



Indrani, la dua infano de hinddevenaj gepatroj, naskiĝis la 12an de novembro 1941 en San Nicolas, sur insulo Arubo, tiama nederlanda kolonio en Maro Kariba, kiu akiris sian sendependecon en 1986.

Ŝia patro, la 5a el 11-infana familio, venis al la insulo el la najbara Gvajano por serĉi laboron. Unu jaron poste li reiris al Gvajano, edziĝis kaj ekde tiam konstante loĝis sur Arubo. La unua infano de la familio estis knabo.

La familia lingvo estis la angla, sed la insula komunikilo estis la papiamenta. Kaj kiun lingvon oni uzis en la lernejoj? La nederlandan. Ĉar la gepatroj volis doni al sia filino eblecon de bona edukiĝo kaj ĉar Indrani parolis nederlande, kiam ankoraŭ ne 16jara, ŝi forvojaĝis al Roterdamo, kie studis ankaŭ ŝia frato. Aliaj kulturo, kutimoj kaj vetero, sed Indrani bone adaptiĝis kaj tre bone studis, ŝi eĉ estis la plej sukcesa en sia klaso de estontaj optikistoj. Sed bone ekkonante la metion de optikisto ŝi malkovris, ke ĉiteknika laboro ne kontentigas ŝin kaj ke ŝi ŝatus esti optometriisto, kiu havas taskojn pli medicinecajn. La plej proksima loko, kie tiutempe eblis studi la elektitan fakon, estis Britujo, do post 3jara nederlandumado en 1960 ŝi transloĝiĝis al Londono. La universitatajn studojn ŝi finis en 1964 kaj aldonajn 3½ jarojn ŝi poste laboris tie jam en sia fako de optometristo.



Tiutempe ŝi spertis ion novan: rasismon. En la komenco de la 1960aj jaroj venis en Britujon multaj enmigrantoj kaj la blankhaŭtaj civitanoj rigardis la alikolorajn homojn kun malamo. En Nederlando oni alrigardis ŝin kun intereso kiel kuriozaĵon, sed ne diskriminaciis. "Mi ne volas esti duaranga civitano" – decidis Indrani. Dum tuta ŝia familio migris al Kanado, Indrani iris al Gvajano. Ŝi trovis tie laboron kaj restis 3 jarojn. Vizitante la familianojn en Toronto dum la malvarma kanada vintro ŝi ne emis elekti tie. Tamen, poste, en 1970, ŝi trovis laboron en Vankuvero, kie la vetero estas pli plaĉa ol en Toronto, ŝi iĝis - kaj daŭre restas - kanada civitano kaj restis enlande por ŝi nekutime longan tempon: 18 jarojn.

Estante ŝajne denaska vagabondo iun tagon Indrani decidis labori portempe alilande. Tial ŝi venis en 1988 kun 2jara laborvizo al Adelajdo, sed ĉar ŝi tre kontentis pri siaj laborkondiĉoj, ŝi restas en Aŭstralio.

Entute 35 jarojn ŝi estis laborinta en sia "metio" kiam ŝi en 2000 emeritiĝis.

Ŝi certe ne enuas de tiam! Anstataŭ la infanaĝa baledo ŝi praktikas "klog"-dancadon, ŝi biciklas, aktivas en la rondo de amantoj de la klasika muziko, en la rondo de legantoj de beletro, ŝi volontulas en "Meals-on-wheels", same volontule helpas enmigrintojn alpropri gi la anglan kaj senpage laboras ankaŭ por ""Oxfam". Kaj ĉu vi sciis, ke ŝi bele aranĝadas florojn en la japana stilo ikebana?





Sed la plej granda amo de Indrani estas vojaĝado. Ne nur ke ŝi loĝis en 6 diversaj landoj, kiel turisto ŝi vizitis amason da aliaj. Ni menciu el ili nur kelkajn interesajn lokojn: Alaskon, Borneon, Galapagojn, Tirolon, Tajlandon, Javon, Vjetnamon, Egiptujon, Jordanion, Turkujon, Ĉinujon, multajn afrikajn landojn, Bolivion, Mongolujon, Nepalon….

Kaj ni ankoraŭ nenion diris pri ŝia esperantista vivo! Ĉar ankaŭ ĝi estas plena de eventoj kaj interesaj spertoj, Indrani konatigos nin pri ĝi en alia fojo.

*Diras hundmanĝaĵfabrikanto al merkatesplorantino: "Ĉu vi kredas, ke ni duonan jaron elspezis 300.000 dolarojn nur por eltrovi, ke nia tipa konsumanto estas malpli ol 15jara, ĉasas katojn, kaj bojas?"*

## La 2a vintrokursaro de "Esperanto en Sudaŭstralio"



okazis la 3an kaj 4an de junio en Hackham South Primary School, fakte tre belega lernejo bonege taŭganta por nia celo!



Partoprenis inter 23 kaj 30 interesantoj, el kiuj pluraj el Azio, nome Ĉinujo kaj Koreujo, ankaŭ unu el Italujo kaj pluraj el eŭropaj kaj sudamerikaj landoj, sed ili jam estas aŭstraliaj ŝtatcivitanoj kaj ne necese devas enkalkuliĝi, kvankam ankaŭ ili estas homoj, ĉu ne?

Nia estimata prezidanto de Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj ties sekretariino venis kaj instruis la meznivelulojn. Indas konfesi, ke tion ili faris bone, eĉ bonege, kio pruvas, ke ili bonege lernas en la Universitato de Novsudkimrujo.

Ankaŭ nia propra Sandor Horvath bonege instruis la komencantojn, kaj Trevor Steele instruis la progresintojn.

Inter la lecionoj estis sufiĉe multe da kafpaŭzoj, kio estis bona, ĉar la kafo, precipe la senkafeina, tre bongustis, precipe kun multe da sukero. Ĉu necesas aldoni, ke ankaŭ la biskvitoj estis bongustaj?

Okazis lumbildprelego de Margaret Furness pri Kanguruinsulo, Haveno Viktoro kaj ĝenerale pri Sudaŭstralio. Ĉio eksterordinare bonege farita.

Parolis ankaŭ nia tre sperta Makso Wearing. Li parolis pri siaj spertoj kiel esperantisto. Li skizis en tre interesa maniero preskaŭ la tutan historion de Esperanto en Sudaŭstralio.

Poste multaj samideanoj, precipe



Zbigniew, esprimis sian opinion, ke Sudaŭstralio verŝajne gvidas la ceteran Aŭstralion en la laboro por disvastigi nian lingvon.

Esprimatis ankaŭ la deziro, ke la aliaj ŝtatoj aŭstraliaj sekvu la ekzemplon de Esperanto en Sudaŭstralio kaj faru same!



Tuj antaŭ la komuna kantado, gvidata de Libby Mortimer, ĉiu el ni estis invitata esprimi siajn impresojn kaj dankojn pri la tuta afero. Montriĝis ke Audrey Felby kaj Ĉingu tre ĝuis la semajnfinon, Ĉingu precipe la lecionojn de Igor kaj Miranda. Ankaŭ Arturo Mortimer ĝuis, sed tre laciĝis la lastajn du aŭ tri horojn de la lasta tago.

Diris Zbigniew ke imponis lin, ke la



entuziasmo de la novuloj estas efektofara. Al Trevor Steele tre plaĉis renkonti malnovajn esperantistojn, sed ke estas bone renkontiĝi ankaŭ kun la novaj. Annie estas tre danka al la gemoŝtoj Igor kaj Miranda, ĉar ili venis al Sudaŭstralio. Ŝi sentas, ke Esperanto estas en bonaj manoj.

**Libby ĝojas, ĉar venis esperantistoj el fremdaj landoj ekzotaj. Al Ŝon plaĉis la nova sperto. Plaĉis al Sofi ke okazis lecionoj nur antaŭtagmeze, kaj ke la distrado, kantado kaj aliaj aktivadoj okazis en amika atmosfero dum la posttagmezoj. Petra opiniis, ke la lecionoj estis pli facilaj ol ŝi antaŭvidis, entute ĉio estis por ŝi bona travivaĵo. Igor opinias ke vintrokursaro estas bona, eĉ bonega ideo. Li volas, ke ĝi uzatu kiel ekzemplo por la diversaj grupoj en ĉiuj partoj de nia lando. Gordon invitis nin ĉiujn reveni post unu jaro al la sama lernejo por ripeti tion, kion ni ĵus faris. Aldone li diris: "Ĉar mi instruas infanojn el malriĉaj familioj, mi asertas, ke Zamenhof inventis Esperanton por miaj lernantoj!"**





***Eta Igor tre ĝojis kiam lia patrino gravediĝis. Igor kuniris kun sia patro al la naskejo, kie ili longe, eĉ longege devis atendi, eĉ atendadi. Fine io okazis, kaj Igor iris kun sia patro por vidi la ĵusnaskiteton. Montriĝis ke lia patrino naskis trinaskitojn! Poste li kolere aliris al sia patrino dirante:***

***"Estis tre stulte lasi Paĉjon mendi la infanon. Vi bone, eĉ bonege, scias, ke li balbutas!"***

## Amuzaj vestoj por esperantistoj

**Ĉe http://www.lot49.de/butiko ekas nova retbutiko. Ĝi ofertas vestaĵojn kun Esperantorilataj desegnaĵoj. Haveblas 29 produktoj. La unuaj motivoj temas pri nova emblemo por Esperanto, arto kaj literaturo. La oferto celas precipe germanlingvanojn, ĉar la produktojn vendas germana firmao. Tamen esperantistoj, kiuj ne regas la germanan, povas rigardi la desegnaĵojn. http:www.lot49.de/butiko**

***Riĉega angla vidvino malsanas. Nur sangotransigo povas savi ŝin. En la lasta minuto oni trovas skoton, kies sangotipo kongruas kun tiu de la vidvino. Li donas kelkajn litrojn da sango tiele savante ŝian vivon. Ŝi tre dankeme donas al li 100 pundojn.***

***Iom poste la vidvino refoje malsanas kaj bezonas ankoraŭ unu sangotransigon. Refoje venas la skoto, kaj ĉio estas bona. Li ricevis 50 pundojn pro sia helpo.***

***Trian fojon li devis helpi savi ŝian vivon, kaj feliĉe ankaŭ tiun fojon li sukcesis.***

***Kompreneble la vidvino estis tre dankema, sed nun estis en ŝiaj vejnoj tiom da skota sango, ke ŝi nur manpremis lin dirante: "elkoran dankegon pro via helpo!"***

## Instrusemajno apud Maribor

**La 27an kaj 28an de majo okazis sur Pohorje, t.e. monto apud Maribor, Instrua kaj Ekskursa Semajnfino. Du grupoj da komencantoj – 6 gejunuloj kaj 5 plenkreskuloj – lernis la unuajn du lecionojn de Esperanto laŭ la Zagreba metodo. Intertempe okazis ankaŭ du ekskursoj en la montaron. Vespere la unuan tagon okazis diskuto pri la programo de EEU-kongreso en 2007 en Maribor. Entute prenis parton 27 personoj el Slovenujo kaj Aŭstrujo inkluzive de kelkaj familioj kun suĉinfanoj, kiuj havis apartan Esperanto-ludprogramon gvidatan de Djordje Obradoviĉ. La kursojn gvidis Vesna Obradoviĉ kaj Zlatko Tiŝljar.**

***Z.T.***

***Neniu eksterlanda gastlaboristo en la Volvofabriko en Gotenburgo rajtas paŭzi por manĝi, ĉar daŭrus tro longe refoje instrui al ili la labortaskojn!***